Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
**MondaFest' • La Monda Festivalo de Esperanto • 20 junio – 20 septembro**

# Festivala Kuriero

**8-a de julio 2020, numero 1**
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova


## Malferme

La Redakcio

Dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto ekzistas jam la multjara tradicio eldoni la Kongresajn Kurierojn. Ĉi-jare plu portas la torĉon la *Festivala Kuriero*. Ĝi aperos ne nur dum la semajno de la Virtuala Kongreso, kiu okazos de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto (datoj de la Montreala UK, kiu estis pro la tutmonda pandemio transmetita al 2022), sed ankaŭ ĉiusemajne dum la tuta periodo de la Monda Festivalo (inter la 20-a de junio kaj la 20-a de septembro). Legu, ĝuu, libere kaj aktive diskonigu ĝin al viaj amikoj en Esperantujo!

## Pli ol 500 jam aliĝis al la Virtuala Kongreso: brazilanoj unuas

LANDOJ KUN PLI OL 10 ALIĜINTOJ




La 27-an de julio UEA formale anoncis la malfermon de la aliĝilo al la Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), kiu okazos kadre de la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020): https://vk.mondafest.net. Individuaj Membroj de UEA rajtas aliĝi senpage ĝis la 26-a de julio, la Tago de Esperanto. Eblas samtempe aliĝi al UEA kaj ĝui la senpagan aliĝon al la VK aŭ partopreni sen aliĝo al UEA kontraŭ simbola kotizo.

En la unuaj tri tagoj pli ol 300 homoj aliĝis per la retejo de VK. Unu semajnon post la lanĉo de la aliĝilo la VK superis 500 aliĝintojn. Tio estas bona ritmo, tial ĉiuj estas kuraĝigataj rapide aliĝi per la reta aliĝilo. Ĝis la redakto de tiu ĉi artikolo aliĝis precize 507 homoj el 67 landoj. En la Reta Revuo (https://revuoesperanto.org/500-a) vi povas trovi la kompletan liston de nombro de aliĝintoj laŭ lando laŭ alfabeta ordo kaj laŭ nombro de aliĝintoj por lando. La grafikaĵo montras la distribuon por la landoj kun jam pli ol 10 aliĝintoj.

La Virtuala Kongreso celas esti plej inkluzivema kiel eble. Se vi trovas malfacilojn aliri pro financaj kaŭzoj, kontaktu info@mondafest.net.

VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO

Aliĝu al la Virtuala Kongreso de Esperanto! https://vk.mondafest.net

### VIRTUALA ESPERANTO-KONFERENCO ILEI — Virtuala Esperanto-konferenco de ILEI

Jam eblas aliĝi al VEKI 2020 (Virtuala Esperanto-konferenco de ILEI), kiu pasos de 25-a ĝis 31-a de julio 2020.

Aliĝu ankaŭ vi: https://veki.ilei.info

# Festivala Lanĉo de la Poŝtkarto de Espero: estu inter la 100 unuaj!

Fernando Maia Jr.


La 22-an de junio ni vizitu kaj subtenu Montrealon 2022: eĉ se la koronvirusa epidemio haltigis




la Universalan Kongreson 2020, ĝi ja ne haltigis montrealanojn! Kun preskaŭ la sama teamo, la Loka Kongresa Komitato (LKK) daŭrigas sian laboron por 2022 kaj esperas ke la evento, pri kiu ili revas jam de pluraj jaroj, okazos eĉ pli bele, grande kaj memorinde!

La LKK de Montrealo, ni amike diras, estas inter la plej spertaj LKK de la historio de Esperanto kaj certe ankaŭ inter la plej persitaj, plej esperaj. Esperohava kaj esperodona estas ilia montreala mesaĝo "Ĉio iros bone", kiu tuŝis Esperantujon kaj fariĝis parto de la spirito de MondaFest' 2020, kune kun la ĉielarka simbolo. Tial, hodiaŭ, la 22-an de junio, la Festivalo oficiale alvokas subteni Montrealon 2022 per la Poŝtkarto de Espero: https://esperanto2020.ca/eo/posxtkarto.

## Inaŭguro de Kanada Virtuala Kinejo: kontraŭ rasismo kaj por indiĝenaj popoloj



La Loka Kongresa Komitato (LKK) de Montrealo (105-a kaj 107-a Universalaj Kongresoj de Esperanto) proponis al la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020) starigon de Virtuala (Kanada) Kinejo: https://esperanto2020.ca/eo/kanada-virtuala-kinejo. En tiu ĉi retejo vi povas libere spekti filmojn de la projekto.

La Virtuala Kanada Kinejo okazigis antaŭfestivalan malfermon la 19-an de junio per la filmo "Nigra Animo", de Martine Chartrand (NFO), okaze de la Junideka Festo, kontraŭ sklavismo kaj kontraŭ rasismo en Norda Ameriko: https://esperanto2020.ca/eo/nigra-animo.

La Kinejo tamen estis oficiale anoncita de la LKK dum la Somera Inaŭguro de la Festivalo, en kiu la LKK havis specialan partoprenon. La inaŭguro de la Kinejo kadre de MondaFest' 2020 okazis la 21-an de junio lige kun la festoj de la Nacia Tago de Indiĝenaj Popoloj en Kanado, kun spekteblo de tri filmetoj fare de indiĝenaj filmistoj.




La 76-a Internacia Junulara Kongreso okazos interrete en la semajno de la 11-a ĝis la 18-a de julio 2020. Ĉeestu de ĉie ajn en la mondo!
La plej granda kaj mojosa junulara Esperanta evento de la jaro atendas vin!
La IJK estas parto de MondaFest' 2020.

Pli da informoj kaj la aliĝilo troveblas ĉe la retpaĝo: https://ijk2020.tejo.org

**Se vi afiŝas ion pri la MondaFest' en la sociaj retoj, uzu #MondaFest2020**

**Tiel pli da homoj ekscios pri ĝi.**

# La Somera Inaŭguro de la MondaFest' 2020

La 20-an de junio UEA komencis la vivelsendon de la Somera Inaŭguro de la Monda Festivalo de Esperanto. La programo daŭris 2:30 horojn kaj spekteblas i.a ĉe *UEAviva*, jutubkanalo de UEA: https://youtu.be/SCMdxEIu128.

Tie vi povas trovi ankaŭ apartajn videaĵojn de la programeroj de la aranĝo.


















































# Somera Esperanto-Studado 2020: virtuale kaj tutmonde

Sonja Zaretskaia, SES-teamano

Ĉi-jare E@I preparas por vi specialan, unikan virtualan Esperanto-lernejon!




La pandemiaj obstakloj ne permesas, ke SES 2020 okazu fizike en Ĉeĥio, kiel antaŭe planite. Sed ĝi tamen ja okazos – virtuale kaj tutmonde! Tiu-ĉi SES okazos 18.-26.7.2020, kaj la ĉefa instruado okazos dum la du semajnfinoj (kun aldona libervola programo inter ili, ĉefe posttagmeze/vespere laŭ la mezeŭropa tempozono).

Dum SES okazos ne nur diversnivelaj kursoj de Esperanto, sed ankaŭ kurso pri Esperanto-literaturo kaj kulturo kaj plia kurso pri tradukado de kaj al Esperanto. La kursojn gvidos spertaj instruistoj. Pliaj detaloj pri ili: https://ses.ikso.net/2020/eo/instruado/. La plej altnivelan kurson de Esperanto gvidos ankaŭ fama aŭtoro de PMEG – Bertilo Wennergren kune kun Birke Dockhorn. Kurson pri la EO-literaturo gvidos sperta Oleg (Oĉjo) Ĉajka el Rusio, la kurson pri tradukado fama verkisto/tradukisto/bardo: Mikaelo Bronŝtejn. Krom tio la partoprenantojn atendas diversaj prelegoj, diskutoj, kvizoj, koncertoj kaj multe pli.

Kompreneble, neniu ĝojas pri la kronvirusa situacio en la mondo – tamen, aliflanke, pere de tia-ĉi "virtuala SES" nian retan Esperanto-lernejon povos partopreni eĉ pli da homoj ol kutime, de ie ajn en la mondo. Pluraj homoj ja ne havas eblon partopreni la fizikan aranĝon – ĉu pro tro longa vojaĝo, ĉu pro financoj, ĉu pro tempomanko, ĉu pro iuj aliaj kialoj. Nun eblos ekhavi sperton de internacia aranĝo kaj samtempe resti hejme. Aldone oni ŝparas kaj monon – la kosto de la reta SES estas signife malpli alta, kaj tempon – ne necesas vojaĝi al la SES-ejo kaj reen. Tiel la aranĝo estas ankaŭ pli ekologia! :)

Aliĝu al la unua virtuala tutmonda SES pere de aliĝilo en la retpaĝo – https://ses.ikso.net/2020/eo/aligxilo/! Ĉu vi havas amikon aŭ konaton, kiu interesiĝus pri la aranĝo? Eble iu de via loka Esperanto-klubo volus partopreni? Rekomendu ankaŭ al ili la ĉeeston! Ja progreson en la lingvo kaj ties instruadon eblas aranĝi rete, kaj poste jam oni povos kun pli alta (bona) lingvonivelo partopreni la Esperanto-eventojn kaj/aŭ movadon senlime!

Nuntempe E@I diligente laboras pri la detaloj de ĉi-speca, pure reta SES: pri ties formo, enhavo kaj la retpaĝo. Pliaj informoj aperos baldaŭ en la retpaĝo de SES kaj same en la vizaĝlibra paĝo https://mallonge.net/SES2020.

Ni esperas, ke vi ĝuos nian aranĝon kaj malgraŭ la pandemio ne mankos al vi la etoso de Esperantaj renkontiĝoj ĉi-somere – ni faros ĉion, por ke nia virtuala SES estu sukcesa!

## En Kontakto! Babilado inter aŭtoroj kaj redaktoro de la revuo Kontakto



Babilado inter **Raoni Sousa, Karina Oliveira** kaj **Rogener Pavinski**

**En Kontakto!** estas oficiala programero proponita de TEJO por la MondaFest'. Ĝi estas serio de vivelsendaj babiladoj kun la redaktoro de la revuo *Kontakto* kaj kunlaborantoj/aŭtoroj de la revuo.

La unua sesio invitis la aŭtoron Raoni Sousa paroli pri la ĉefartikolo de la nova (3/2020) numero de la revuo *Kontakto*. Prezentis kaj gvidis la sesion Karina Oliveira, Estrarano de TEJO, kaj Rogener Pavinski, redaktoro de *Kontakto*.

Spektu ĉe *UeaViva*:
https://www.youtube.com/watch?v=lOZ05ZSYT4o